

Brazilei

jaro 2 n-ro 9 2008

Renato Corsetti

Parolo de
spertulo



Speciale:
Ĉina globkalkulilo
en prilingvaj kursoj





JEN LA SUNO,
JEN LA LUNO...

osmar

Portu la mondon de Esperanto
en vian lernoĉambbron!



Enhavo

Parolo de spertulo	
Prof-ro Renato Corsetti	06
Reago	
Suverenaj lingvouzantoj	17
Kovrilartikolo	
Ĉina globalkalkulo	24
Li vorte debutas, sed parole balbutas	13
Vizito al bieneto	14
Ago kaj stato — partcipioj	20
Multflanka kursgvidanto	30
Korektinda letereto	32
Interlingvistikaj studoj	38
Esperanto en la Bibliotekojn	37
Bezonataj lerniloj	40
Entuziasma lernoĉambro	41
Bildrakonto popularigas sciencon	42
Eldiroj	04
Karaj geinstruistoj	05
Pliriĉigu vian vortprovizon	15
Reteja Mondo	39
Traduko-defio	43

ilei

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliĝinta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)
www.ilei.info

ilei BR
www.ileibr.org

Provizora Sekciestro: Joseo Tenorjo
Sekretariino: Conceição Rodrigues
Kasisto: Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso
www.ileibr.org
geinstruistoj@ileibr.org
biblioteko@ileibr.org
butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefono: (11) 2055-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: Joseo Tenorjo
grafikarango: Joseo Tenorjo
kontakto: revuo@ileibr.org
kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues.

Kunlaboris en tiu ĉi numero:
Renato Corsetti, Paulo Sergio Viana,
Adriana Pavani, Aloísio Sartorato,
Edson Ponciano, Osmar da Silva Alves,
Geraldo Mattos, Emerson Werneck
kaj Jader Rodrigues.

Eldiroj



“Kiam lernanto spertas
iun malfacilaĵon dum
lernado, la instruisto
devas trovi kio malhelpas lin
kompreni ĝin. Jen defio por tiu,
kiu instruas: eltrovi malsamajn
manierojn instrui la saman
aferon.”

*Ester Pillar Gossi, brazila edukistino
(Nova Escola, 214/2008 - p.20)*



“Konstanta plago en
Esperantujo estas la
agado de ĉiusepacj
harfendantaj gramatik-
umantoj kaj pseŭdoerudiciuloj pri
lingvaj aferoj, kiuj, sidante en siaj
mucidaj kabinetoj, elcerbigas
arojn da komplikaj reguloj por
ilustri siajn teoriajn vidpunktojn
pri la strukturo kaj evoluo de
Esperanto. Ili neniel kapablas
enkapigi jenan gravan averton: ju
pli da elektebloj ekzistas en lingvo
inter diversaj vortformoj, des pli
malfacila estas lernado kaj uzado
de la lingvo.”

*Bernard Golden, (1925 - 2008)
artikole en Kajeroj el la Sudo,
aprilo 1996.*



Geinstruistoj

Paciga kaj dankinda momento

Jen momento tre agrabla por mi: sciigi vin, ke plia n-ro de Brazilei estas preta. Tiam mi paciĝas kun ĉiuj legantoj, kiuj pacience atendadas novan numeron de la revueto. Tio estas momento ankaŭ por pluan fojon danki ĉiujn, kiuj iel kontribuas por ke la revuo iĝu pli kaj pli leginda.

Ni kaptas la okazon memorigi vin, ke proksimiĝas la tempo (re)membriĝi al la Sekcio por garantii, en 2009, pluan ricevon de Brazilei.

Ni kaptas la okazon ankaŭ informi al E-grupoj, dezirantaj interŝanĝi revuojn, ke ni disponigas pdf-version de Brazilei en la retejo de la Sekcio. Se iu grupo volos aboni retversion de Brazilei, sufiĉos sendi al ni sian retadreson.

Papera versio de Brazilei estas ekskluzivaĵo de la sekcianoj kaj de eventualaj apartaj abonantoj.

Nun ni invitas vin renkontiĝi kun niaj ĉi-numeraj kunlaborantoj.

Agrablan legadon!

“En lingvo kuŝas la koro de popolo”

[La Gazeto, 138/2008 p.24]

La ĉi-numera intervjuito estas vaste konata pro sia pledo por simpla lingvouzado de Esperanto, kiel proponis ties iniciatinto mem. Per sia retejo <www.bonalingvo.it>, li ne nur kompilas liston de simplaj samsignifaj vortoj, sed ankaŭ faras ĝustan omaĝon al samnoma verko de la svisa psikoterapiisto kaj lingvisto Claude Piron.

Corsetti estas ne nur diskoniganto de la bona lingvo, li ankaŭ havas bonan koron, aŭ se vi preferas, tutmondan koron. Cetere, nur tiu kiu havas tutmondan koron povas kompreni la valoron kaj utilon de la bona lingvo.



Tial li estas amata de esperantistoj el pluraj mondopartoj. Ne nur amata: ankaŭ premiita, ĉi-jare, per la esperantista pacpremio **Deguĉi**, grava premio starigita de Oomoto, en 1987, cele distingi agantojn kaj projektojn, kiuj uzas Esperanton kiel rimedon por monda paco laŭ la idearo de L.L. Zamenhof kaj laŭ la instruoj de Deguĉi Onisaburo.

Ĝuu agrablan kaj profitan renkonton kun li sur la sekvaj paĝoj!

spertulo

Prof. **Renato**
Corsetti



Naskiĝis en Romo la 29-an de marto 1941, estas itala esperantisto, lingvisto kaj antaŭa prezidanto de UEA (ĝis 2007). Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio de septembro 2007.

Post studadoj en la universitato (en la fakoj ekonomio, entreprena organizado kaj poste sociolingvistiko kaj psikolingvistiko), li laboris dum multaj jaroj kiel bank-direktoro en Italujo. Ekde la mezo de la 1990-aj jaroj, li laboris kiel helpanto kaj poste profesoro pri Psikopedagogio de Lingvo kaj Komunikado en la Universitato de Romo.

Nuntempe li loĝas en Italujo kun edzino (ankaŭ esperantisto) Anna Löwenstein kaj du filoj, ambaŭ denaskaj esperantistoj.

Brazilei: Vi diplomiĝis pri Ekonomio, poste pri Sociolingvistiko kaj Psikolingvistiko, inkluzive vi fariĝis profesoro pri Psikopedagogio de Lingvo kaj Komunikado en la Universitato de Romo. Ĉu Esperanto iel direktis vin al tiu tute nova laborvojo?

Corsetti: Certe jes. En la komenco mi transiris al studado de sociolingvistiko pro la kunligoj inter Esperanto kaj politiko. La politiko de lingvoj estas fako de sociolingvistiko. Poste mi efektive serĉis neesperantistan profesoron, okupiĝantan pri infana dulingveco, por ke li-ŝi sekvu iom science la eksperimenton pri trilingveco ĉe miaj filoj. Tiel ekestis la kontakto kun la universitato, kiu fine portis min instrui psiĥolingvistikon.

“Oni devas instrui Esperanton laŭ Esperanto kaj ne laŭ la franca aŭ la portugala.”

Brazilei: Esperanton vi uzadas hejme, regione, internacie kaj virtuale. Oni emas supozi, ke vi pli esperantumas ol italumas!

Corsetti: Eble, jes. Se mi provas fari takson de mia uzo de Esperanto kaj de la itala, eble temas pri 70% en Esperanto kaj 30% en la itala.

Brazilei: Laŭ via sperto kiel edukisto de denaskaj infanoj, ĉu vi kredas, ke denaskulaj gepatroj estas idealaj E-instruistoj por ordinaraj kursoj en lernoĉambro?

Corsetti: Ne nepre! Ili estas idealaj, nur se ili ankaŭ lernis pri instruado aŭ havas naturajn kapablojn pri tio. Instruado al bebo nur postulas longtempan paroladon al ili, kaj ili mem laŭgrade malkovras la regulojn de la lingvo. Tio daŭras multajn horojn tage de la 1-a ĝis la 3-a jaro (minimume). En la klasĉambro oni normale ne disponas pri tiom da tempo, kaj la lernantoj ne estas beboj. Do, oni devas alvoki ankaŭ je ilia rezonkapablo pri gramatiko.

Brazilei: Okaze de intervjuo al tiama retejo Ĝangalo, vi skribis, ke danke al viaj filoj, vi komprenis kiel vere funkcias Esperanto. Kiom multe el tiaj spertoj eblas enkonduki en lernoĉambron?

Corsetti: Multe pli ol oni imagas. Zamenhof kreis lingvon regulan kaj apartan. Ni aŭdu lin en la Fundamenta Krestomatio:

“Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn.....

Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), - li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.”

Beboj aŭtomate komprenas tion, kion Zamenhof celis, ekzemple ke fratino estas vorto el tri elementoj, *frat-*, *-in-* kaj *-o*, kaj ke la tuta lingvo estas kombino de elementoj neŝanĝeblaj. Diru tion al la homoj, kiuj diras *literatoro* anstataŭ *literaturisto*.

Do, esence oni devas instrui Esperanton laŭ Esperanto kaj ne laŭ la franca aŭ la portugala.

Brazilei: Etnaj lingvoj postulas memorigadon de sia vortstoko, dum planlingvo kia Esperanto, postulas, krome, fajnegan rezonadon por plivastigo de sia vorttrezoro. Ĉu pro tio multaj komencantoj rezignas ĉeestigi lecionojn post du-tri monatoj da lernado, ĝuste kiam ili perceptas, ke Esperanto estas tia lingvo?

Corsetti: Mi ne kredas. Homoj, kiuj komprenas kiel rezoni en Esperanto, ofte amuziĝas per la nova “ludilo” kaj ĝia logikeco. La motivoj por forlaso de kurso estas multaj (kaj tio okazas ankaŭ pri aliaj lingvoj). Foje mankas tempo, foje mankas emo ĉar oni kontentigis la komencon scivolemon, foje via amiko ne plu povas veni al la kurso, ktp.



Brazilei: Laŭ retvendejo Amazon, pli ol 30 milionoj da ekzempleroj de la lernilo “Teach Yourself Esperanto” jam disvendigis tutmonde. Freŝdate vi recenzis lernilon de via samlandano Bruno Migliorini, nome “Manuale di Esperanto” (unua eldono 1923), kiu daŭre furoras en via lando. Tiam vi aludis la klarecon de plej multaj memlernantoj, kiuj preferas koni rapide la regulojn de la lernata lingvo, ĝian funkciadon, havi ĝeneralan bildon pri la sonoj, ktp. Se tiel prezenti, ŝajnas, ke Esperanto plej taŭgas por memlernado ol por ĉeestaj lecionoj...


Corsetti: Efektive multaj el la plej bonaj esperantistoj, kiujn mi konas (Humphrey Tonkin aŭ Probal Dasgupta, ekzemple), memlernis. Memlernantoj havas fortan volon lerni, kaj tio kombine kun la facileco de Esperanto faras miraklojn. Mi arde deziras memlerni la araban, sed per la lernolibro simple mi ne sukcesas. Se mi ne vizitas kurson kun arablingva instruisto, mi neniam lernos paroli.

Brazilei: Interreto populariĝas jaron post jaro. Nenio miriga estas en tio. Kio ja mirigas, estas kiel kelkaj homoj, kiel vi, sukcesas ĉeesti en tiom da poresperantaj agadoj en la interreto!

Corsetti: Nu, efektive mi sekvas nur kelkajn listojn pri kiuj mi interesiĝas. Mi pensas, ke la reto iĝas la lando de ĉiuj komunikantoj. Eĉ grandaj paperaj gazetoj dissendas senpage parton de siaj artikoloj. Mi, ekzemple, ricevas senpage kaj senpete multajn artikolojn de la brita *The Economist*. Kial? Evidente la gazeto komencas pensi, ke potencialaj legantoj neniam pretos aĉeti la paperan version. La adaptiĝo de la Esperanto-organizaĵoj al la reta mondo estas io, kio ankoraŭ apenaŭ komenciĝis.

Brazilei: Ĉu vi bonvolos klarigi al niaj legantoj, ĉefe al tiuj kiuj ankoraŭ ne legis la verkon de Claude Piron (La bona lingvo), kiel kaj kial estiĝis via retejo “www.bonalingvo.it”?

Corsetti: Kiel mi diris pli supre, Zamenhof kreis lingvon simplan kaj racian, en kiu oni konstruas novajn vortojn el jam ekzistantaj radikoj. Sed dum la unua duono de la dudeka jarcento regis pensoskolo, Kalocsay kaj Waringhien, ekzemple, kiuj pensis, ke por ke Esperanto estu valora ĝi devas simili al la grandaj eŭropaj kulturlingvoj (ĉefe la franca). Tio klarigas kial oni aldonis vorton post vorto aŭ el latinidaj lingvoj (“tarda” anstataŭ “malfrua”) aŭ el la okcidenta scienca ĵargono (“kardiopatio” anstataŭ “kormalsano”). Simple oni rezignis je la normala funkciado de Esperanto. Claude Piron en la verko “La bona lingvo” parolas pri tio kaj donas ekzemplojn pri facila kaj logika Esperanto.



Sur tiu bazo naskiĝis la retejo <www.bonalingvo.it>, kiu estas je dispono de ĉiuj, kiuj volas, ke Esperanto restu same simpla kaj facila kiel oni kreis ĝin. Proponojn oni povas sendi rekte al mi aŭ al la listo <la-bona-lingvo@googlegroups.com>.

Brazilei: Almenaŭ du aliaj esperantistoj prizorgas liston de simplaj vortoj, nome Gotou Humihiko <<http://www3.ocn.ne.jp/~gthmhk/indekso.html>> kaj Thierry Salomon <http://www.uea.org/vikio/Superflujaj_Vortoj>. Ĉu la listo de <www.bonalingvo.it> konkurencas kun ili aŭ ĉerpas el tiuj fontoj?

Corsetti: Tute ne. Niaj nunaj listoj komence naskiĝis el iliaj listoj kaj almenaŭ Thierry Salomon daŭre kunlaboras.

Brazilei: Kiam kaj kie oni uzu la simplan bonan lingvon?

Corsetti: Ĉiam! Ne ekzistas okazoj, kiam oni rajtas ne uzi ĝin. En kelkaj okcidentaj socioj ekzista speciala, kiun parolas la instruituloj por distingi sin de la popolo. Io tia nek ekzistas, nek ekzistu en Esperanto. Ni estas ĉiuj egalaj.

Brazilei: Kiel kursgvidantoj kaj aŭtoroj de facilaj lego-libroj i.a. povas uzi la retejon bonalingvo.it?

Corsetti: Simple per komparado de la vortoj, kiujn ili devas instrui kun la listoj en <www.bonalingvo.it>. Se foje ili havas dubon pri la vorto “komputero” ili iru al nia retejo. Ili ankaŭ povas aktive kunlabori per montrado de problemaj vortoj.

Brazilei: Jorge Camacho, en sia eseo “La mava lingvo”, aludas al “simplismo de Corsetti” kaj al “bonismo” de Piron. Kio komuna kaj kio nekomuna enestas en ambaŭ aluditaĵoj?

Corsetti: Mi kredas, ke kaj la bonismo de Piron kaj la simplismo de Corsetti estas la sama afero. Mi akceptas ĉion el la ideoj de Piron, kaj mi diskutis kun li ĝis lia morto. Lia lasta konsilo estis: “kardiologo” = “korkuracisto” aŭ eĉ pli simple “koristo”. Se ni diras dentisto, kial ne koristo? Kiel vi scias, Piron daŭre atentis pri la malfacilaĵoj de Esperanto por ĉinoj

Brazilei: Kian estontecon vi bildigas por Esperanto virtuale kaj reale en la bona kaj malbona rondoj?

Corsetti: Mi kredas, ke Esperanto iam venkos. Provizore forta lando povas malhelpi tion kaj antaŭenpuŝi sian lingvon, sed en la longa daŭro homoj malkovros kiom peza estas lingva hegemonio. Eble la estonta superrego de la ĉina devigos multajn repensi, kial ili ne volis lerni Esperanton kaj nun devas lerni la ĉinan, kiu objekte estas pli malfacila ol la angla por ĉiuj okcidentanoj.

La Esperanto-movado ĉiuokaze estos tie por atentigi ilin pri tio.



← Gvidilo por la instruanto

www.ileibr.org/butiko

Memorilo por la lernanto →



LI VORTE DEBUTAS, SED PAROLE ANKORAŬ BALBUTAS

Responde al retmesaĝo de lernanto, ĵus konatiĝinta kun Esperanto kaj deziranta aĉeti plej bonan vortaron, la profesia lingvinstruisto Emilio Cid, el la urbo São Vicente/SP, tiam konsilis:

“Plej bona vortaro por komencanto estas tiu kun plej malmultaj vortoj. Plej bone dirate: aĉetu nenian vortaron ankoraŭ; dediĉu vian tempon al la vortoj de la baza kurso kaj al ilia elparolo.

Ĉiu volas memori gramatikajn regulojn kaj vorto-liston, sed bone elparoli kaj praktiki tion, kion oni jam lernis, malmultaj volas. La rezulto de tio estas amaso da neparolantoj.

Ordinare lernanto scivolas pri kelkaj vortoj, kiujn li ŝatus koni, sed malofte li sukcesas respondi demandojn pri la unua leciono. Sufiĉas demandi lin, kiel oni diras “kie” aŭ “kiam” por ke li baraktu. Estas lernanto, kiu scivolas pri vortoj kiaj “progreso”, sed ne scias respondi, se lia instruisto demandas, kiel oni diras “ele” aŭ “ela” en Esperanto!!! Li cerbumadas, mense kapriolas per sintaksa analizo, antaŭ ol respondi aŭ ĝis apudsidanto flustros la li la respondon: <ŝi>.

Parol-flueco nepras ekde la unua leciono. Ne atendu akiri ĝin poste. Trompas sin tiu, kiu pensas, ke per pli da vortoj oni pli facile parolos. Vi eĉ povas koni multajn vortojn, vi povas uzi ilin dum skribado, sed vi ne sukcesos rapide aliri ilin dum parolado.

Ne estas mia intenco konvinki vin, ĉar mi scias, ke tio, kion mi diras ŝajnas tute sensenca. Tial forgesu kion mi diris, se vi celas ne la parolan, sed sole la skriban lingvon. Eĉ tiel, mi rekomendas la poŝvortareton de Edgard Monteiro Machado.”



Emilio Cid

UEA-delegito, volontula radikronikisto ĉe Radio Havana (Kubo) kaj Radio Boa Nova (Brazilo), preleganto kaj studemulo pri spiritualismaj temoj, flue parolas ses lingvojn. Cele helpi komencantojn plibonigi sian parolfluecon, li eldonis rilatteman videon (portugale) kun multaj konsiloj kaj sugestoj. Ĝi estas senpage elŝutebla el <<http://www.fluencia.uni.cc>>.

Vizito al bieneto

Laŭ raporto de Paulo S. Viana, kiu ankaŭ fotis.

La 25-an de oktobro 2008 Lorena Esperanto-Klubo okazigis plian lernekskurson, kadre de sia motiva projekto "Subĉiela Leciono". Ĉi-foje la promenantoj vizitis bieneton kaj domon, kie naskiĝis la fama brazila verkisto Monteiro Lobato - "Bieneton de la Flava Pego", en la urbo Taubaté, ŝtato San-Paŭlo.



Partoprenis dek unu gesamideanoj el la urboj Lorena, Guaratinguetá, Jambeiro kaj eĉ el la fora nordorienta urbo Fortaleza. En bela vetero, la grupo legis biografieton de Monteiro Lobato kaj praktikis dialogon pri la teksto. Poste oni lernis la nomojn de pluraj birdoj en Esperanto. Sekvis promeno tra la bela bieneto kaj vizito al la domo, kiu funkcias kiel muzeo.

Oni fotis la grupon kaj multaj turistoj atentis pri la uzado de Esperanto kaj pri la verda flago. Post la promenleciono la grupeto lunĉis en agrabla restoracio, en Taubaté. Oni planas okazigi proksiman "Subĉielan Lecionon" en Lorena, komence de 2009, ĉe "Bieneto de Floroj".

Bakalaŭro pri Juro, eldonisto kaj entreprenisto, Monteiro Lobato fariĝis unu el plej influhavaj brazilaj verkistoj en la 20-a jarcento. Lia verkaro, ĉefe tiu porinfana, tre populariĝis tra la tuta lando. Fama estis lia pledo por naciigo de la enlanda petrolo-esplorado.



Monteiro Lobato
(1882 - 1948)



PLIRIĈIGU VIAN VORTOPROVIZON

Edson Ponciano

Ĉi-numere, Braziliei proponas al vi taksilon bazitan sur vortoj el “*Vivi estas danĝere*”, romano de **István Nemere** (verkisto kaj tradukisto el Hungario) eldonita de Hungara E-Asocio en 1988. Fama en Esperantio tial, ke li verkis kaj eldonis ĉe HEA (inter 1981 kaj 1989) dek unu romanojn, Nemere estas unu el tiuj aŭtoroj, kies verkaro ampleksas vastan gamon de aktualaj temoj kiaj societo, politiko, scienco i.a.



1. Aplomb/a – A: el griza metalo, kies kemia simbolo estas Pb; B: koncerna al birdo kun poŝgorĝo; C: rilata cementon por ŝtopi dentkavaĵojn; Ĉ: tia, ke lia memfido estas neŝancelebla.
2. Grinc/o – A: misformo de trajtoj pro streĉo de vizaĝmuskoloj; B: Akra sono estigata per froto de io sur malmolaĵo; C: flugo sen utiligo de motor-forto; Ĉ: karakteriza krio de rabobirdoj.
3. Ĉirp/i – A: elpreni likvaĵojn per mano aŭ ilo; B: difekti ion, senorde ĝin faldante; C: eligi akran sonon similan al tiu de grilo; Ĉ: paroli per kvazaŭbirdeta voĉo.
4. Pred/e – A: sur paŝtebla herbo-ebenejo; B: perforte kaptata; C: ĉe masonaĵo starigita sur grundo; Ĉ: en malhumila maniero.
5. Omen/e – A: sub supernatura forto; B: je probableco de sukceso; C: per fatala antaŭvido; Ĉ: laŭ okazo sendependa de nia volo.
6. Puĉ/o – A: perforata provo faligi ŝtatan reĝimon; B: frapo per interplektitaj manfingroj; C: forta movo kapabla forpuŝi ion; Ĉ: eligo de io el ujo ĝin entenanta.
7. Sojl/o – A: transversa ŝtono de pordo-bazo; B: malsupra parto plata de ŝuo; C: pavimo de ejo sur kiu oni paŝas; Ĉ: tero rigardata kiel bazo por konstruo.
8. Tret/i – A: alterni meti la piedojn unu antaŭ alia; B: preskaŭ fali pro mispaŝo; C: iri per regulaj rapidaj paŝoj; Ĉ: forte premi per la piedojn.
9. Beton/o – A: ŝtona aŭ asfalta tegaĵo de stratgrundo; B: aglutina pasto kapabla rapide malmoliĝi; C: artefarita bitumo miksitita kun inerta materialo; Ĉ: miksaĵo de cemento kun ŝtonero kaj sablo.
10. Sprit/a – A: rilata al la malo de materio; B: kontraŭanta la kutiman rilaton inter afero kaj tono; C: inventema, elturniĝema; Ĉ: animstato.

Respondoj

- 1. Aplomba** – [C] Tia, ke lia memfido estas neŝancelebla. [Opcio A = plumba]; [Opcio C = plomba]. “Nun jam li ne aspektas tiel aplomba, kiel...” p.96
- 2. Grinco** – [B] Akra sono estigata per froto de io sur malmolaĵo. [Opcio A = grimaco]; [Opcio Ĉ = kriĉo]. “Padroni kun grinco bremsis antaŭ la ŝtuparo...” p.53
- 3. Ĉirpi** – [C] Eligi akran sonon similan al tiu de grilo. [Opcio A = ĉerpi]; [Opcio B = ĉifi]; [Opcio Ĉ = pepi]. “Varmegis la nokto, ie ĉirpis griloj.” p.50
- 4. Prede** – [B] Perforte kaptata. [Opcio Ĉ = fiere]. “...nur siajn gardistojn li ĵetis al ni prede.” p.74
- 5. Omene** – [C] Per fatala antaŭvido. [Opcio B = ŝance] [Opcio Ĉ = hazarde]. “Iom omene mi pensis: se tiu ulo mortinta...” p.43
- 6. Puĉo** – [A] Perforta provo faligi ŝtatan reĝimon. [Opcio B = pugnobato]. “Post la puĉo Branko kaj mi savis la prezidanton.” p.37
- 7. Sojlo** – [A] transversa ŝtono de pordo-bazo. [Opcio B = plandumo]; [Opcio Ĉ = grundo]. “Transpasintaj la sojlon mi restigis la pordon...” p.35
- 8. Troti** – [Ĉ] Forte premi per la piedoj. [Opcio B = stumbli]; [Opcio C = troti]. “...li ĵetos sin al tiu senforma karnomaso kaj tretos ĝin...” p.130
- 9. Betono** – [Ĉ] Miksaĵo de cemento kun ŝtonero kaj sablo. [Opcio A = pavimo]; [Opcio B = cemento]. “Samsekunde iu korpo eksplodis el malantaŭa betono.” p.48
- 10. Sprita** – [C] inventema, elturniĝema. [Opcio B = humura]; [Opcio Ĉ = humora]. “Ni ne havis tempon por taksi lian spritan rimarkon...” p.54

Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli.

3 – 4: **kontentiga**; 5 – 7: **bona**; 8 – 10: **bonega**

SUVERENAJ LINGVOUZANTOJ

Reago al la artikolo “Ĉu Esperanto evoluas sane?”
(Brazilie n-ro 8) de Prof-ro Sylla Chaves



Mag. Emerson Werneck

*Eks-instruisto kaj kursadministranto
de Berlitz-lernejoj en Braziljo/DF*

Estas por mi granda honoro, povi respondi al artikolo de s-ro Sylla Chaves, mia unua instruisto, per la metodo “Aŭdu kaj Lernu”, en Belorizonto/MG, Brazilo, en 1986. Li ĉiam havas mian admiron kaj respekton, pro tio, kion li reprezentas en la Brazila Movado de Esperanto. Mi volas do respekteme, reagi al liaj komentarioj pri mia intervjuo.

Unue, mi volas diri, ke mi ne volis havigi la impreson, ke vortaristoj ne kontribuas al la lingvo pere de siaj propraj sugestoj pri vortoj. Sed, same kiel en la kazo de verkistoj, vortaristoj ne povas kaj ne devas havi la lastan diron pri la uzado aŭ ne de siaj vortoj. Mi feliĉas, pro la fakto, ke s-ro Chaves ne konkludis tion, ke li devas krucigi la brakojn kaj rezigni al la observado de la evoluo de la lingvo, fare de la suverena parolantaro.

Mi diris, kaj ankoraŭ diras, ke la plej facila lingvo por portugallingvanoj estas Esperanto. Tion pruvas la fakto, ke la averaĝa brazilano lernas sufiĉe por bone komuniki en Esperanto en ĉirkaŭ du jaroj, sed bezonas kvar aŭ kvin jarojn por bone regi la hispanan. Tio okazas pro du faktoroj: 1e- La hispana estas por li aŭ ŝi pli facile komprenebla ol Esperanto, sed por produkti bonan elparoladon, entonacion, kaj gramatike korektajn frazojn hispane, li bezonas multe pli da tempo, ĉar la leksiko kaj la gramatiko estas neregulaj kaj ne predikteblaj. Uzante la pensmanieron de s-ro Chaves, oni devus konkludi, ke ne la hispana, sed la kataluna aŭ la galega estas la plej facilaj lingvoj por portugallingvanoj. Sed tio ne estas la vero. Por bone regi unu el tiuj du lingvoj la averaĝa brazilano aŭ portugalo bezonas minimume tri aŭ kvar jarojn da studado, kvankam du jaroj da lernado de Esperanto sufiĉus por atingi la alt-mezan nivelon; 2e- La simileco mem inter la

portugala kaj la hispana kaj la kataluna, kaj la galega, malfaciligas la lernadon, ĉar la averaĝa portugallingvano tuj imagos, ke li aŭ ŝi bone parolas la alian lingvon, sed fakte li aŭ ŝi nur parolos bonan (ekzemple “portunhol”, miksaĵon de la du lingvoj.

En la surfaco, “Kiel vi fartas?” estas pli malfacila por brazilano ol “¿Cómo está usted?”, sed la lingvo hispana, same kiel iu ajn nacia lingvo, bezonas pli ol komprenebleco por esti konsiderata facila. La sama validas por rusoj kaj bulgaroj, aŭ por aliaj nacilingvaj paroj. Komprenebleco estas nur parto de la lernado. Pli gravas la facileco kaj simpleco de gramatiko, kaj, evidente, ankaŭ reguleco. Paroli pri lernado de lingvo helpata de instruisto estas tute korekte kaj memevidente. Lernado de lingvoj ankaŭ dependas de la helpo de la instruistoj, almenaŭ en la komenco. Kiel simple estus ĉio, se la hispana estus farita nur de similaj strukturoj al la portugala! Sed, oni bone scias, ke preter la nivelo de “¿Cómo está usted?”, ekzistas maro de malsimileco inter la hispana kaj la portugala.

Por legi Cervantes kaj bone kompreni lin, mezklera brazilano penos multe pli ol por legi William Auld en Esperanto, tio konsiderante, ke li aŭ ŝi havas la saman bonan konon pri la du lingvoj. Esperanto, pro sia reguleco kaj logiko, ĉiam estos pli facile lernebla por brazilanoj ol etnaj lingvoj, ekde la komenco. Kaj s-ro Chaves ne pravas, kiam li diras, ke brazilano devas lerni Esperanton ekde la komenco. Estas multo en la lingvo, kio ne estas fremda por li aŭ ŝi.

S-ro Chaves trafe dividis la esperantistaron en tri kategoriojn (apogantoj, lernintoj kaj perfektigemaj uzantoj. Sed pri la 2-a kategorio, li asertas, ke se ili estas tiuj, kiuj decidas pri la evoluo de la lingvo, Esperanto mortos. Tio ne estas vero. Lingvistike parolante, la uzo de lingvoj fare de neklera plejmulto ne mortigas ilin, sed ŝanĝas ilin. Tio okazis al la latina, ekzemple. Kaj hodiaŭ la latina ne estas morta, sed transformita al la romanaj lingvoj. Se oni ne volas, ke tio okazu al Esperanto, oni devas prizorgi la instruadon de la lingvo. Ĉar, se la plejmulto el la geinstruistoj ne estas efikaj, ni havos tuj plejmulton da homoj, kiu malbone lernis Esperanton, tamen utiligas ĝin ĉiutage, kaj determinos la destinon de la lingvo en ne tiel malproksima estonto.

La tria kategorio, “la agantaj kaj perfektigemaj uzantoj de la lingvo”, “havas ja la rajton decidi pri la estonto de la lingvo, inkluzivante ĝian

vorto-trezoron”. S-ro Chaves denove pravas. Sed la fakto estas, ke tiun rajton havas ankaŭ la esperantistaro de la dua kategorio, kaj ili emas fari decidojn pli rapide kaj senpense ol la aliaj esperantistoj.

S-ro Chaves daŭrigas sian artikolon, dirante, ke “Kiel la ekologiistoj, ni devas ne nur registri, sed AGI. Ili, kontraŭ la senrespondeca monavido de la potencaj industriistoj kaj la pasiveco de la konsum-socio. Ni, kontraŭ la malfaciligo kaj dispecigo de la lingvo, dum senkontrola kresko kaj uzado de nepravigeblaj neologismoj”. Sed mi ne laciĝas emfazi, ke la “nepravigeblaj neologismoj” estos elektitaj de la plejmulto, estu ĝi klera aŭ ne, estu ĝi movadema aŭ ne. Tio estas lingvistika fakto, kaj ne nur deziro necesos por ŝanĝi ĝin.

Sylla Chaves saĝe, kiel kutime, raportas, ke “Resume, Esperantaj verkistoj kaj vortaristoj ne nur sekvu la senordan evoluon de la lingvo, sed AGU, kiel la saĝaj ekologiaj verduloj. Ni estu la saĝaj lingvaj verduloj. Ankoraŭ estas tempo por savi la mondon. Kaj ankoraŭ estas tempo por savi nian lingvon. Montri la bonan vojon estas mia rajto kaj devo”

Mi, kiel esperantisto, incita de li, akordas kun li 100 procente. Sed, kiel lingvisto, mi devas atentigi lin pri la fakto, ke la “malamiko” estas inter ni. Se ni ne bone zorgos la instruadon de Esperanto, oni riskas baki milojn da mezklerajn lernintojn, kaj eĉ la plej saĝa vortaristo ne povus fari ion ajn kontraŭ la decidoj de la plejmulto. Do, la sola savebleco estas disvastigi plej forte tiun Esperanton, kiun oni volas parolata en la estonto. Mia rolo malsamas, kiel observanto scienca. Sed ne mia deziro, kiel entuziasma esperantisto. Do, en la esenco mi kaj s-ro Chaves pensas same.

Gogo la testudo – *Martin Weichert*



Ago kaj Stato

Prof. Geraldo Mattos

www.gmverda.com.br



Resumo de participoj:

*Participoj estas formoj, kiuj markas la tempon de la fakto, ne tiun de la parolanto: **Prezidonto**: antaŭ ies prezido [Obama nun] / **Prezidanto**: dum ies prezido [Bush nun] / **Prezidinto**: post la prezido [Clinton nun]. Kaj tio validas egale por adjektivoj kaj adverboj.*

Mi parolos ĉi tie kun miaj gelegantoj pri unu el la kelkaj lingvaj punktoj, kiuj estas tiel delikataj kompare kun niaj gepatraj etnolingvoj, ke eraroj facile insidas nin. Ĉion mi provos pruvi [aliteracio indikas mian urĝon] per ekzemploj de la Ekzercaro de la Fundamento de Esperanto, identigataj per la numeroj de paĝo kaj frazo.

Neniu dubas, kio estas ago kaj kio estas stato.

Agoj havas komencon kaj finon, sed ili povas aborti inter tiuj du limoj, dum statoj havas nur komencon kaj finon, ĉar aborto egalas al fino. Ekzemploj de agoverboj kaj statoverboj multas, kaj sekve ili eĉ ne estus bezonataj, ĉar ilian uzon ĉiu bone mastras. Mi tamen prenos frazon kun verboj el tiuj du klasoj, ĉar per ili mi povos porti ĉi tiun mian eseeton al kalma haveno:

Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis [20:9].

La unua kaj tria estas agoverboj. La ago *veni* povas komenci kaj fini tie, kien ni volis, sed multo povas okazi por abortigi tiun volatan agon: pontorompo, kiu haltigas la veturilon, aŭ akcidento, kiu portas

la veturanton al hospitalo... La agon *veki* mi komentas per propra ekzemplo: ne ĉiam mi sukcesas vekti mian kvarjaran filon Viktor el lia plumbopeza dormo... Interrompo tamen eblas: en la necesejon!...

La dua estas statoverbo. Multaj homoj siestas, nome dormas post la tagmanĝo, sed ne malofte telefono ilin vekas... Interrompo finas la tiaman staton dormi.

Por pli sekure konfirmi miajn ideojn, mi aldonas alian frazon, kiu inversigas la jam donitan per tio, ke nun la unua kaj tria estas statoverboj, kaj la dua agoverbo:

Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [18:15].

Ni povus pensi, ke la vorto *akompani* estas agoverbo, ĉar akompananto agas, sed interrompi kaj fini akompanon lasas alian staton: soleco.

La distingo estas necesa por la kompreno de la participojj.

Du frazoj de la Ekzercaro plene instruas nin pri la pasivaj participojj:

Mono havata estas pli grava ol havita [22:12].

Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [22:13].

Tie ne aperas la homo, kiu havas, nek la homo, kiu kaptas. Ilin ni aldonu:

Homo monon havanta estas pli grava ol havinta.

Ĉasisto paseron kaptinta estas pli bona, ol aglon kaptonta.

Estos facile konstati, ke la supraj kaj la malsupraj frazoj estas sinonimaj:

Mono dum ĝia havo estas pli grava ol post ĝia havo.

Pasero post ĝia kapto estas pli bona, ol aglo antaŭ ĝia kapto.

Homo dum ĝia havo de mono estas pli grava ol post ĝia havo.

Ĉasisto post lia kapto de pasero estas pli bona, ol antaŭ lia kapto de aglo.

El tio ni venas al la ĝusta senco de niaj participojj, kiuj neniam

aludas al la tempo de la dialogo, sed al la tempo de la fakto, kiun la verbo anoncas:

-anta / -ata	dum la fakto konata per la verbo	-as	dum la parolo
-inta / -ita	post la fakto konata per la verbo	-is	antaŭ la parolo
-onta / -ota	antaŭ la fakto konata per la verbo	-os	post la parolo

Jen ekzemploj de agoverboj, unu netransira kaj alia transira:

veni		Veki			
venanta	dum veno	vekanta	dum veko	vekata	dum veko
veninta	post veno	vekinta	post veko	vekita	post veko
venonta	antaŭ veno	vekonta	antaŭ veko	vekota	antaŭ veko

Jen nun ekzemploj de statoverboj, unu netransira kaj alia transira:

dormi		akompani			
dormanta	dum dormo	akompananta	dum akompano	akompanata	dum ak.
dorminta	post dormo	akompaninta	post akompano	akompanita	post ak.
dormonta	antaŭ dormo	akompanonta	antaŭ akompano	akompanota	antaŭ ak.

Kaj fine malagraba surprizo:

dormi		akompani	
dorminta	dormanta	akompanita	akompanata



Apartaj mondoj: verboj kaj participoj
Geraldo Mattos, eldonejo Fonto, 1999.

Danĝeraj missencoj povas veni de la estintaj participoj:

1) La senco de la aktiva kaj pasiva estintaj participoj de la statoverboj estas simpla neo de la antaŭa stato:

vivinta [ne plu vivanta, nome mortinta]

aminta [ne plu amanta] / amita [ne plu amata]

Tiuj participoj neniam havas la senco de la efektiva frazo:

vivinta homo ≠ homo, kiu vivis [homo tiam vivanta]

aminta homo ≠ homo, kiu amis [homo tiam amanta]

amita homo ≠ homo, kiun amis [homo tiam amata]

2) Estas nenormala prefero pri la pasiva estinta participo de transiraj agoverboj, kiuj indikas estontan staton, kvankam ofte pli bona estus la estanta, kaj ne malofte la estinta estas rekta eraro kontraŭ la logiko.

Mi restu nur kun erara frazo de André Albault en lia redaktado de la libro *Fundamento de Esperanto*, p. 239 (Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, 1963):

Okaze de la Dua Universala Kongreso (Ĝenevo, 1906), la Lingva Komitato decidis, ke estu reviziitaj la naciaj tradukoj de la radikoj entenataj en la Universala Vortaro fare de komisionoj franca, germana, angla, rusa kaj pola.

Nu, la esprimo *estu reviziitaj* indikas la novan staton post la revizio, sed estas mallogike fari decidon pri stato, kiun eble neniam komisiono portus al la fino. La ĝusta formo estus la estanta participo, kiu indikus la agon revizii:

Okaze de la Dua Universala Kongreso (Ĝenevo, 1906), la Lingva Komitato decidis, ke estu reviziataj la naciaj tradukoj de la radikoj entenataj en la Universala Vortaro fare de komisionoj franca, germana, angla, rusa kaj pola.

Tiaj eraroj devenas de la gepatraj lingvoj de la plej granda parto de la esperantistoj, kies lingvoj havas nur unu pasivan participon, dum Esperanto da ili havas tri... Krome, tiu sola pasiva participo povas esti jen estanta, jen estinta.

Pensi Esperanton nacilingve estas morta peko...

ĉina globkalkulilo

en prilingvaj kursoj



Joseo Tenorjo

Okaze de E-aranĝo, kiun mi partoprenis pasintoktobre, en la urbo Lorena, mi ĉeestis interesan programeron gvidatan de la edukisto Jorge Linck, el urbo Tririveroj, en Rio, pri uzado de ĉina globkalkulilo. Post kelkaj kalkul-provoj, evidentiĝis la oportuna utiligado de tiu lernilo por praktikado de numeraloj en prilingvaj kursoj.

Oni povas konstrui globkalkulilon per plej diversaj recikligeblaj materialoj: papero, botelŝtopiloj, rostaĵo-stangetoj, glaciaĵo-stangetoj, butonoj, ŝaŭmplastaj globetoj... Por lerni fari kalkulilon per plastaj suĉtubetoj, vizitu la retejon de Brazilei <www.ileibr.org/revuo>, en la sekciro 'Lude kaj Lerne'. Por fari kalkulilon per glaciaĵo-stangetoj vizitu la retejon (angle): <http://www.geocities.com/learner_center/abacus.html>.

Tiuj, kiuj ne emas al manartaĵaj laboroj, certe povos akiri de Jorge Linck mem kalkulilon el ligno. Mendu ĝin rekte ĉe li per <jorgelinck@yahoo.com.br>.

Ĉina kalkulilo konsistas el vertikalaj vergetoj enhavantaj po 5 globetoj sube (alidirite, tera flanko) kaj po 2 globetoj supre (alidirite, ĉiela flanko). La vergetoj, legataj de dekstre maldekstren, montras: unuon, dekon, centon, milon.... Pro didaktikaj celoj, la proponata modelo limiĝas al milo-kolumno. La subaj (teraj) globetoj reprezentas la numeron 1 kaj la supraĵ (ĉielaj) la numeron 5. Laŭ ilia horizontala vicordo, ili kalkuliĝas kiel 1 - 10 - 100 - 1000 ... (sube) kaj 5 - 50 - 500 - 5000... (supre). Per ĝi eblas fari diversajn kalkulojn, laŭ la lerteco de la kalkulanto, pli rapide ol per ciferecaj kalkuliloj.


Legu sekvapaĝe sugestojn por ekzercigi viajn lernantojn.

Plej antikva kalkulrimedo estis la homaj manoj kaj fingroj. Tiu metodo tamen ne efikis por kalkuli grandkvante. Tiam oni komencis elpensi aliajn manierojn kalkuli ne nur la kiomon de vendataj kaj aĉetataj objektoj, sed ankaŭ la kostojn de tiuj objektoj. Globkalkulilo estas unu el pluraj tiaj rimedoj elpensitaj de homoj cele faciligi kalkuladon. Laŭ esploroj, oni trovis spurojn de ĝia uzado jam en Mezopotamio antaŭ pli ol kvin mil jaroj. Oni nomas la eltrovaĵon 'Tabulo el Salamiso', omaĝe al la urbo, kie ĝi estis trovita. Spuroj de globkalkulilo estas trovitaj ankaŭ ĉe aliaj popoloj en diversaj epokoj sub variaj nomoj: 'abacus' ĉe romanoj, 'nephualtzin' ĉe aztekoj, 'stochty' ĉe rusoj kaj 'suan-pan' ĉe ĉinoj, kie ĝi estas uzata jam de ĉ. 2500 jaroj, kaj de kie ĝi migris al Japanio, antaŭ ĉ. 400 jaroj, rebaptita kiel 'soroban'.

Aktivado

- Prezentu simplan resumon pri ĉina globkalkulilo kaj klarigu la celon de la aktivado, nome praktiki numeralojn.
- Laŭeble partoprenigu la lernantojn ankaŭ en la konstruado de iliaj kalkuliloj.
- Supozante, ke la ludantoj lernis kalkuli ĝis nur 100, limigu provizore la rezulton de la kalkuloj al tiu numero. Male, se ili scipovas kalkuli pli ol tion, invadu la kolumnojn de centoj kaj miloj.
- Ĉiu kalkulado nepre estu laŭtvoĉa. Laŭte diktu la kalkulerojn: $20 + 4 - 5 + 2...$ (dudek plus kvar minus kvin plus du...)
- De tempo al tempo haltigu la kalkuladon kaj petu, ke ĉiu lernanto aparte kaj laŭtvoĉe eldiru la registritan rezulton. La lernanto(j), kies provizora rezulto ne egalas al tiu registrita sur via kalkulilo, restos for de la ludo, kaj la ludo-kalkulado daŭros, kun sinsekvaj haltoj kaj kontroladoj fare de vi, ĝis restos nur unu lernanto kun registrita rezulto egala al tiu via.
- Laŭ kiomo da lernantoj, proponu, ke ili duope grupiĝu por praktiki inter si laŭtvoĉan dikto-kalkuladon.
- Komence enkonduku nur adicon kaj subtraĥon (kun eventualaj leĝeraj klarigoj pri multobligo kaj divido). Praktikadon de ĉi tiuj du lastaj kalkuloj proponu nur en postaj aktivadoj.
- Krom kalkuloj, vi povos proponi jenan lerteco-ludon: kiom da fojoj oni sukcesas adicii iun numeron (ekz-e 230) dum unu minuto. Venkos la lernanto, kies korekta numero-rezulto estos la plej alta.
- Kiel vi jam perceptis, antaŭ ol proponi tiun aktivadon al viaj lernantoj, iom ekzerciĝu per la kalkulilo. Se vi havas aliron al interreto, vizitu iun priteman retejon. Komprenoble vi ne bezonas fariĝi fakulo pri ĉina globkalkulilo por ludigi viajn lernantojn, sed iom da regeco, dum ĝia uzado, vere impresos viajn lernantojn!

kelkaj kalkulo- specimenoj



Antaŭ ol komenci kalkuli ion ajn, ĉiuj globetoj devas kuŝi supre (ĉiele) kaj sube (tere) tiamaniere, ke la meza divido-trabeto estu tute libera. Por funkciigi la kalkulilon ekmovu la globetojn ĝis ili tuŝos la divido-trabeton, laŭ la kalkulado dezirata: adicio, subtraĥo, multobligo aŭ divido.

Adicio

$20 + 4$ — Por registri la numeron 20, movu du globetojn ($10 + 10$) de la (tera) deko-kolumno, ĝis ili tuŝos la divido-trabeton; same por registri 4: movu kvar globetojn de la (tera) unuo-kolumno. Observu, ke la provizora rezulto estas la sumo de ĉiuj globetoj tuŝantaj la divido-trabeton, nome 24.



Kalkulilo
kun
registro
20



Kalkulilo
kun
rezulto
24

$24 + 40$ — En la ĉiela deko-kolumno estas tri globetoj ankoraŭ ne almovitaj ($10+10+10$), sed ni bezonas aldoni al nia kalkulo 40. Por solvi tion, almovu unu globeton de la ĉiela deko-kolumno ($+50$), kaj demovu unu globeton de la tera deko-kolumno ($+ 50 - 10 = 40$). Rezulto: 64.




Kalkulilo
kun
rezulto
64

Subtraĥo

30 - 20 — Malkiel ĉe adicio, en kiu oni aldonas kalkulerojn, ĉe subtraĥo oni deprenas ilin: por subtraĥi 20 el 30, ekzemple, demovu du globetojn (10 + 10) de la tera deko-kolumno. Rezulto: $30 - 20 = 10$.



Kalkulilo
kun
registro
30



Kalkulilo
kun
rezulto
10

Alia ekzemplo: por subtraĥi 22 el 64



Kalkulilo
kun
registro
64

demovu du globetojn de la tera unuo-kolumno



Kalkulilo
kun
registro
62

poste demovu unu globeton, de la ĉiela deko-kolumno (-50), kaj almovu tri globetojn en la tera deko-kolumno (+30). Rezulto: 42.



Kalkulilo
kun
rezulto
42

Multobligo


42×3 — Ĉar multobligo estas nuraj sinsekvo de adicioj, por ke oni venu al dezirata rezulto, sufiĉas adicii la saman numeron tiom da fojoj kiom necese ($42 + 42 + 42 = ?$). Alia maniero veni al sama rezulto estas fari la multobligon laŭ la vicorda valoro de la numeroj: $42 \times 3 = ?$ — unue oni adicie registru la numeron 2 trifoje kaj poste la numeron 40 trifoje ($2+2+2+40+40+40$). Rezulto: 126.



Kalkulilo
kun
registro
 $2+2+2=6$



Kalkulilo
kun
registro
46



Kalkulilo
kun
registro
86



Kalkulilo
kun
rezulto
126

Divido

$12 : 4$ — Por fari divido-kalkulon sufiĉas depreni la koncernan numeron kiomfoje ĝi estas postulata. Ekzemple: por dividi 12 per 4, subtraŭna la numeron 4 kiom da fojoj tio eblas. La rezulto estos la kiomo da fojoj, ke la numero 4 estis subtraŭnita. Ĉi-ekzemple, la kiomo de 4 demoveblaj el 12 estas 3. Ĉi-okaze la rezulto (3) estas rondcifera, ĉar registriĝis nenia restaĵo.

fontoj:

<http://www.educ.fc.ul.pt/docentes/opombo/seminario/abaco/historia.htm>

<http://www.ee.ryerson.ca:8080/~elf/abacus/history.html>

http://www.geocities.com/learner_center/abacus.html

Linck, Jorge: gvidfolio pri *Calculadora Chinesa* - Lorena, oktobro, 2008.

Multflanka kursgvidanto

Ĉiu kursgvidanto de Esperanto estas samtempe: instruanto, propagandisto kaj defendanto de la zamenhofs heredaĵo .



Adriana Pavani

(Barra Bonita/SP)

*“Esti esperantisto signifas ne nuran lingvoscion.
Ĝi estas destino. Misio. Sapiro al pli bona mondo.*

*Vera esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas, kaj li estas
esperantisto antaŭ ol li lernas la lingvon”.*

- Julio Baghy

Esti esperantisto, tiel kiel diris Julio Baghy, estas misio. Kaj kursgvidanto havas tre gravan mision: instrui Esperanton. Kaj bone instrui ĝin. Kiel do oni diras, ke li estas propagandisto kaj defendanto de la zamenhofs heredaĵo? Nur instrui ne sufiĉas? Mi konkludas, ke ne.

Ni ĉiuj, kiuj instruis, instruas aŭ intencas instrui, devas pensi, ke ni laboras samtempe en tri aferoj: instruado, disvastigado kaj vivado en Esperantujo. Pro tio, ĉiu kursgvidanto estas samtempe instruanto, propagandisto kaj defendanto de la zamenhofs heredaĵo.

Kompreneble, sen la instruado de la lingvo, ne eblas daŭrigi la laboron de Zamenhof. Se oni ne konas la lingvon, kial do iu devas lerni aŭ instrui ĝin? Instruistoj estas gravaj al la movado, ĉar ili daŭrigas la konon de la lingvo.

Ĉiu kursgvidanto estas propagandisto de Esperanto, ĉar se ni volas, ke la idealo de Esperanto daŭru, tucerte la afero dependas de bona

propagando. Ne sufiĉas diri “Esperanto estas la lingvo internacia”, sed montri, ke ĝi vere funkcias, ke ĝi ebligas komunikadon. Kaj kursgvidanto estas unu el la plej bonaj propagandistoj de la zamenhofa idealo, ĉar li devas montri Esperanton en la klasĉambro kaj ne nur instrui ĝin. Montrante la lingvon internacian, pruvante, ke ĝi funkcias - kaj bone -, ke ĝi vere ebligas interhoman komunikadon. Se kursgvidanto ne tiel agas, certe li donos nur la konon de la lingvo al la lernantoj, sed ne instigos la lernantojn praktiki la lingvon. Li povas eĉ deklami la dek ses regulojn de Esperanto, sed se li ne montros kiel oni uzas ilin, lia laboro ĉesos kiam la lasta regulo de Esperanto estos instruita.

Se kursgvidanto bone propagandas la lingvon, la lernanto ne estos simpla lernanto, sed fervora idealisto. Rimarku: mi diras fervora idealisto, kaj ne fanatika idealisto - tiu, kiu nur ĉasas erarojn en la lernado kaj ne vivas esperante. Mi tute konsentas, ke ni devas korekti kaj bone korekti la lernantojn, por ke ni ne fuŝu nian tre karan lingvon. Sed ni ne devas troigi en la korektado, ĉar antaŭ ol fuŝi la lingvon, ni apartigos la esperantistojn disde Esperanto. Kaj tiu ago ne kongruas kun la frata idealo. Do, la bona propagandisto estas ankaŭ bona idealisto, kiu vibras por la novaj konkeroj de la movado, kaj ĉiam provas disvastigi la lingvon, pere de la plej bonaj manieroj: li ekzempligas la vivadon de la lingvo, montrante la fratan idealon, kiu estas kunigi la homojn. Se kursgvidanto postulas, ke siaj lernantoj perfekte sciu la gramatikon de Esperanto, kaj mem ne montras vivadon pere de la lingvo, li ne estas bona idealisto kaj propagandisto, ĉar anstataŭ kunigi la lernantaron, li apartigas tiujn, kiuj iam volis lerni la lingvon, kaj tiu afero ne apartenas al la zamenhofa idealo, la heredaĵo postlasita al ni.

Konsiderante tiun ideon, ni povas konkludi, ke ĉiu kursgvidanto de Esperanto, krom esti propagandisto, ankaŭ estas defendanto de la Zamenhofa heredaĵo, ĉar li ne nur lernas kaj instruas la lingvon, sed lernas kaj instruas la idealon, kiu devas daŭri en la estontaj generacioj.

Se Esperanto ekzistas ĝis hodiaŭ kaj plifortiĝas jaro post jaro, kvankam malrapide, granda parto el tiu konkero estas ŝuldata al bonaj kursgvidantoj, kiuj samtempe instruas, diskonigas kaj, finfine, defendas la heredaĵon, kiun Zamenhof lasis al ni, kiuj, antaŭ ol esti kursgvidantoj, ĉefe estas esperantistoj.

Korektinda letereto



En la antaŭa n-ro de Brazilei ni publikigis letereton, didaktikele skribitan, en kiu aperas plej oftaj eraroj (entute 40), kiuj stumbligas brazilanojn. Sekvas la originala teksto kun postaj komentoj.

	Kara amiko,	
01	La libro, kiu vi sendis estas tre bela.	
02	Mi ekkomencis legi ĝin antaŭ du tagoj kaj sia	03
04	rakonto ŝajnas interesan . Multaj vortoj mi ankoraŭ	05/06
07	ne konas kaj tial mi necesas iri plurfoje al vortaron .	08
09	Sed konsultante la vortaron, ĉiam aperas novajn	10
11/12	vortojn kaj tiu iom malkuraĝas min.	13
14	Sabato , dum ni parolis pri legado, vi diris, ke se	
15	mi atentus ne nur la tekston, sed ankaŭ la kuntekston,	
16	mi ne bezonus tiel ofte konsulti vortaron. Mi jam tentis	17
	tion, sed legi sen vortaro estas tre malfacila .	18
	Mi volus scii, se en via domo havas libron kun	19/20
21	pli facila tekstoj por ke mi povos legi ĝin. Kiel mi	22/23
	estas aventurema, al mi plaĉas libron , ke rakontas pri	24/25
	aventurejoj. Mi memoras interesan libron — bedaŭrinde	
26	mi forgesis ĝian nomon - verkita de iu franco jam	
27/28	mortita . Se tia libro havas vin , mi ŝatus legus ĝin.	29/30/31
	Morgaŭ mi iros en la kursejo . Se vi ankaŭ	32/33
34/35	partoprenos de la leciono, bonvolu portu la libreton.	36
37	Mi esperos vin ĉe la bushaltejo kaj tien mi restos ĝis	38
39	kiam vi alvenos.	
40	Brakumo ,	
	komencanto	

01 Mankas akuzativo ĉe **KIU**. Jen tipa frazkonstruo ne facile komprenata, se lernantoj ankoraŭ pensas nacilingve, laŭ ties fiksa vortordo, kiu en Esperanto estas tute libera. Tiuokaze nepras, ke ili kutimiĝu al jena vortordo: ‘La patron mi vizitis’, ‘belan domon mi aĉetis’ k.s.. Nur tiel eblos al ili lerni kiam kaj kiam ne uzi akuzativon post rilatpronomo KIU. Konsideru jenajn ekzemplojn:

La libro estas tre bela. La libron vi sendis.
[La libro, la libron vi sendis, estas tre bela.]
La libro, kiun vi sendis, estas tre bela.

La libro estas tre bela. La libro kuŝas sur la tablo.
[La libro, la libro kuŝas sur la tablo, estas tre bela.]
La libro, kiu kuŝas sur la tablo, estas tre bela.

02 La prefikso EK jam signifas ‘komenciĝo de iu ago’, tial sufiĉas *Mi komencis legi ĝin...* aŭ *Mi eklegis ĝin...*

03 Koncerne uzadon de poseda refleksivo SIA, lernolibroj kutimas gvidi lernantojn per jena klarigo: “SIA neniam povas esti subjekto, sed ĉiam rilatas al ĝi”. Regulo tre klara, sed nur por tiuj, kiuj jam scipovas distingi subjekton disde aliaj frazeroj. Iuj lernantoj ne perceptas, ke ‘*sia rakonto*’ estas subjekto de la verbo ‘*ŝajnas*’. Ĉar, laŭ regulo, SIA ne povas roli kiel subjekto, oni do devas skribi ‘*ĝia* (de la libro) *rakonto*’. Oni emas rezoni, ke ‘*sia rakonto*’ rilatas al ‘*La libro...*’ (unua alineo). La vorto ‘*libro*’ ja estas subjekto, sed de alia verbo (esti) en alia frazo!

04 Rakonto ŝajnas pli **interesa**, se verkanto prizorgas ankaŭ la lingvon! Zamenhof, en unu el siaj prilingvaj respondoj, konsilas, ke, se oni dubas pri akuzativo, estas plibone flankenlasi ĝin ol erare uzi ĝin. Se lernantoj provizore tute ne uzus akuzativon, iliaj tekstoj fariĝus 50% ĝustaj! La aliajn 50% oni korektu per diligenta studado kaj praktikado.

05 06 Sufiĉas ŝanĝi vortordon de frazo por ke iuj lernantoj baraktu! Se tamen ili trovos la saman frazon alimaniere aranĝitan,

eventuale ili memoros akuzativigi la komplementon: *Mi ankoraŭ ne konas multajn vortojn.* [Vidu rimarkon 1]

07 *Mi bezonas iri...* Multaj faras grandan konfuzon inter **bezoni** kaj **necesi**. Oni memoru, ke ‘bezoni’ estas transitiva kaj ‘necesi’ ne-transitiva. Alidirate, la unua postulas komplementon (kun akuzativo) kaj la dua ne: **iu** (subjekto) bezonas **ion** (rekta objekto); **io** (subjekto) necesas. Ekz-e: *ni bezonas monon por progresigi Esperanton. Mono necesas por ke Esperanto progresu.*

08 Post prepozicioj AL kaj ĜIS oni ne uzas akuzativon, ĉar ili jam indikas celmovon. Tiel sufiĉas: *...iri al vortaro.*

09 Antaŭ ol konatiĝi kun tiu fajna participo-formo, lernantoj ordinare skribas kaj parolas ĝuste: *Kiam mi konsultas vortaron, ĉiam aperas...* Post ĝia enkonduko, plej multaj lernantoj (influatataj de la portugala, kies adverba participo estas vaste uzata en la ordinara lingvouzo), komencas erare skribi kaj paroli: *Pluvante, mi restis hejme, Vizitinte ŝin, lia koro iĝis pli trankvila* k.m.a.. Okazas, ke tiaj frazoj estas ĝustaj en la portugala (kiu permesas uzadon de tiel nomata ‘absoluta gerundio’), sed en Esperanto ne. Esperante oni uzas adverban participon nur tiam, kiam la subjekto de ambaŭ propozicioj estas la sama: *Dum mi legas, mi multe konsultas vortaron = Legante, mi multe konsultas vortaron.* Se la subjekto en ambaŭ propozicio malsamas, nepras do reskribi la frazon alimaniere: ‘*Pluvante, mi restis hejme*’ devas do fariĝi *Ĉar pluvis, mi restis hejme* aŭ *Pro la pluvo, mi restis hejme* aŭ *Pluvis, kaj tial mi restis hejme.* ‘*Vizitinte ŝin, lia koro iĝis pli trankvila*’ fariĝu ‘*Post ol viziti ŝin, lia koro iĝis pli trankvila.*’ aŭ ‘*Post kiam li vizitis ŝin, lia koro iĝis pli trankvila.*’

10 11 *...aperas novaj vortoj...* Alia tipa inversigo de vortoj: ‘novaj vortoj’ ne estas verba komplemento, kiel iuj povas supozii, sed ja subjekto de la frazo! [Vidu rimarkojn 1 - 5/6]

12 U-korelativoj, uzataj kiel adjektivaj montraĵaj pronomoj, bezonas iun vorton por determini ĝin: *...kaj TIU situacio iom...* aŭ *...kaj TIU afero iom...* Alia solvo, ĉi-kuntekste, estas uzi la korelativon TIO, kies signifo estas <tiu afero> *...kaj tio iom...*

13 ...*malkuraĝigas min.* aŭ ...*senkuraĝigas min.* Komparu: ‘Li estas kuraĝa, sed ne kuraĝas vojaĝi per aviadilo. Kial tia vojaĝo malkuraĝigas lin?’

14 ‘Sabato’ estas tago-nomo. La adverba formo, por indiki cirkunstancon pri tempo, povas esti *sabaton*, *en la sabato*, *sabate*, *pasintsabate*, *lastsabate* ktp.

15 16 Multaj diras kaj skribas ‘Li petis, ke mi envenus’. Tio okazas, ĉar ili forgesas simplan regulon, nome, ke la verbo-finaĵo en rekta parolo fidele reproduktiĝas en nereкта parolo. Alidirate, se oni rekte registras “Li petis min: ‘Envenu!’”, reproduktante ĝin, sed nun nerekte, oni devas registri: “Li petis, ke mi envenu”. Same (rekte): *Vi diris: ‘Se vi atentus... / ...vi ne bezonos...’* kaj (nerekte): *...vi diris, ke se mi atentus... / ...mi ne bezonos...* La formo per ‘atentus / bezonus’ ankaŭ estas ĝusta, sed en alia kunteksto, ekz-e, se la supozata leganto jam estus senatente leginta ion.

17 Falsa amiko! Komparu: La **tento** konsulti vortaron dum legado estas neeltenebla. Mi jam **provís** legi sen vortaro...

18 **A**-vortoj kaj **o**-vortoj estas gramatike parencaj: bela kanto, gaja saluto. Same **e**-vortoj kaj **i**-vortoj: bele kanti, gaje saluti. S-ro gramatiko permesas, ke **e**-vortoj foje rilatu kun **a**-vortoj: tre bela, amike helpema, sed malpermesas, ke **a**-vortoj rilatu kun **i**-vortoj. Tial evitu ĝeni s-ron gramatikon per tiaj kuniĝoj: *legi sen vortaro estas malfacila* kaj anstataŭe diru kaj skribu: *legi sen vortaro estas malfacile* aŭ *legado sen vortaro estas malfacila*.

19 Rekta parolo: *Mi volis scii: ‘Ĉu en via domo...?’* Nereкта parolo: *Mi volis scii, ĉu en via domo...* [Vidu rimarkon 15/16]

20 21 Jen plia misgvida influo de la portugala. Esperante ‘havi’ signifas ‘posedi’ (Li havas libron) neniam ‘esti’, ‘ekzisti’. Do diru kaj skribu: *...en la domo estas (troviĝas) libro...*

22 Plej ofte lernantoj forgesas plurnombron ĉe adjektivoj: *facilaj teksto*j.

23 ...*por ke mi povu...* Post la esprimo ‘por ke...’ U-modo estas uzata, ĉar plej ofte temas pri ago-celo.

24 Plia tipa misgvida influo de la portugala. Diru kaj skribu: *Ĉar* (pro tio ke) *mi estas aventurema...*

25 *Al mi plaĉas libro...* aŭ *Mi ŝatas libron...* [Vidu rimarkojn 10/11]

26 Plia tikla gramatikero: ĉu skribi per KE aŭ KIU? La solvo tamen estas facila: Kiam ajn eblas diri ‘o qual’, uzu KIU: ...*la libro, KIU* (o qual) *rakontas pri...* . Se eblas diri ‘os quais’, uzu KIUJ: ...*la libroj, kiu*j (os quais) *rakontas pri...*

27 Neniu dubas pri tio, ke la vorto ‘interesan’ rilatas al ‘libron’. Ambaŭ en akuzativo. Bonege. Okazas, ke la vorto ‘verkita’ ankaŭ rilatas al ‘libron’! Do, ...*libron... verkitan de...*

28 Diru kaj skribu: *mortinta*. Kaj notu tion: ĉiuj verboj akceptas la participajn formojn ANT/INT/ONT, sed nur verboj, kiu postulas akuzativon, akceptas la participajn formojn AT/IT/OT. Do, *mortinta verkisto* (*espereble ne mortigita*) *kun forgesita nomo...*

29 30 31 *Se tian libron havas vi...* aŭ per alia vortaranĝo: *Se vi havas tian libron...* [Vidu rimarkon 1]

32 Iuj lernantoj ne scias kion fari, kiam apudiĝas du verboj. Ne sciante kiun finaĵon uzi kun la alia verbo, ili simple ripetas la finaĵon de la unua. La solvo estas facila: la dua (kaj eventuale tria verbo) alprenas la finaĵon “i”: ...*mi ŝatus legi ĝin. Li volas manĝi, sed ne volas iri aĉeti ion por manĝi.*

33 Mankas akuzativo de movo: ...*mi iros en la kursejon.*

34 La vortordo en Esperanto estas libera, sed kelkaj vortetoj (bonŝanĉe treege malmultaj) tute ŝanĝas la sencon de frazo laŭ ilia pozicio. Komparu: “Li iris ankaŭ al la festo” signifas, ke, krom iri al aliaj lokoj, li iris ankaŭ al la festo. “Ankaŭ li iris al la festo”, male,

signifas, ke, krom aliaj homoj, ankaŭ li iris al la festo. Cele eviti dubojn, do preferu: *Se ankaŭ vi partoprenos...*

35 Plia enŝovo de la portugala. Diru kaj skribu: *partopreni en leciono* aŭ *partopreni lecionon*.

36 ...*bonvolu porti...* [Vidu rimarkon 32]. Ĉi-okaze tamen eblas diri ankaŭ: *bonvole portu...* aŭ *bonvolon, portu...* kaj eĉ *bonvolu, portu...*

37 Falsa amiko! *Mi atendos vin ĉe la bus-haltejo kaj esperas, ke vi venos akurate.*

38 Post ol iri tieN la koncernulo restos TIE atendente la amikon.

39 Sufiĉas diri kaj skribi: ...*ĝis vi alvenos*. ĜIS, kiel prepozicio, signifas 'kiel longe'; kiel konjunkcio, ĜIS signifas 'ĝis la momento kiam' kaj do KIAM iĝas tute nenecesa: *Li ne scias ĝis kiam* [kiel longe] *li eltenos labori*. *Li laboros ĝis* [la momento, kiam] *li emeritiĝos*.

40 Krom deziri al vi *brakumon*, ni deziras ankaŭ *bonan lernadon!*

Ed & Pris – Eder Benedetti



Interlingvistikaj studoj

Jader Rodrigues

La lastan septembron, de la 13-a ĝis la 17-a, komenciĝis nova trijara postdiploma studado pri Interlingvistiko en Universitato Adam Mickiewicz (UAM), Poznano, Pollando.

Ĉi-foje, aliĝis al la kurso po du partoprenantoj el Irano, Kroatio kaj Usono, po unu el Francio, Grekio, Koreio kaj Ukrainio. Du afrikanoj, kvankam aliĝintaj, ne sukcesis ricevi la polan vizon kaj akompanos la kurson virtuale ĝis la dua sesio, fine de januaro 2009. Ankaŭ du brazilanoj aliĝis al la nuna kurso. Temas pri du minasanoj: Flávio Augusto Rosendo el Belorizonto kaj Jader Rodrigues da Silva el Lavras.

En ĉi-sesio la kursanoj ĉeestis lecionojn pri ĝenerala k esperanta fonetiko (Prof. John Wells), pri esperanta kulturo (Prof. Aleksander Melnikov kaj Prof. Zbigniew Galor), pri la unua periodo de la esperanta literaturo (Mag. Lídia Ligeza kaj Mag. Tomasz Chmielik) kaj pri komunikado (D-ino Ilona Koutny). Tridek du prelegoj (de la posta dutaga simpozio “Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko”), kiu festis la dekjariĝon de la interlingvistikaj studoj en Poznano, kaj ankaŭ prelegoj de la sekva 24-a ARKONES (Artaj Konfrontoj en Esperanto – semajnfina kultura renkontiĝo) konsistigis la sesion. Ne mankis, kompreneble, speciala kaj vespera bankedo al kiu ĉiuj studentoj estis invititaj.

La kurso pri interlingvistiko en Poznano estas postdiploma specialaĝo, kiu daŭras tri jarojn kaj estas dividita en ses sesiojn, kiuj okazas ĉiam fine de septembro kaj komence de februaro. Do, kursanoj devas tien iri ses fojojn entute, prepari laboraĵojn hejme pri ĉiu studobjekto kaj konsulti rete siajn profesorojn. Antaŭ la komenciĝo de la studoj, kursanoj submetiĝas al testoj pri gramatikaj konoj kaj ankaŭ pri e-kulturo kaj dum ĉiu sesio submetiĝas al ekzamenoj pri ĉiu studita fako. Fine de la kurso, studentoj devos pretigi diplomlaboraĵon kaj submetiĝi al fina ekzameno antaŭ ol ricevi la koncernan universitatan diplomon.

Pli da informoj en la retejo: <www.staff.amu.edu.pl/~interl>.

Esperanto estas...

Se en via kursejo estas disponebla DVD-legilo, la filmo *"Esperanto estas..."* bone taŭgas por prezentado en lernoĉambro, ĉefe komence de novaj lernoperiodoj. La filmo, dividita en 6 partojn kaj prezentata en moderna kaj vigla maniero, estis kreita en internacia kunlaboro de pluraj filmemuloj kadre de la organizo E@I <www.ikso.net>. Ĝi estas elŝutebla el <<http://www.esperantoestas.blogspot.com>> aŭ <<http://br.youtube.com/user/Esperantoestas>>.



Novaĵretejo Eventeo

Eventeo estas nova interreta bulteno, kiu uzas Esperanton por traduki gazetajn novaĵojn el pluraj mondopartoj. Ĝi estas bunte kaj bele fasonita kun enhavo tre varia kaj ĝisdata. La novaĵoj grupiĝas, laŭ mondopartoj, en plej diversajn kaj aktualajn temojn. Tiaj novaĵretejoj estas esencaj por evoluigo de lingvoj, ĉar ili registras la lingvon uzatan en la ĉiutago. Konsekvence, ili bone taŭgas por ellernado de lingvoj, ĉar per ili legemaj lernantoj pliriĉigas sian vortprovizon, ĉerpante el plej diversaj fontoj de homagadoj: politiko, sciencoj, ekonomiko, sporto, kulturo, natura medio, distraĵoj k.a.. Vizitu ĝin ĉe <<http://www.eventeo.net>>.

Bezonataj lerniloj



Nome de burundaj instruistoj, mi nun volas vin informi ke, en aŭgusto, la eduka sekcio de ANEB (Nacia Asocio de Esperanto en Burundio) dissendis ses instruistojn al ses vilaĝoj de la lando por eksciigi pri la internacia lingvo Esperanto al la gelernantoj, kiuj estis en ferioj.

La instruistoj estis en tri provincoj: Buĵumbura, Bururi kaj Makamba. La celo de la unusemajnaj seminarioj estis, ke oni surloke eksciigu Esperanton kaj eklernu ĝin por ke poste oni fondu novajn E-klubojn. Instruante, la gvidantoj uzis la kirundan kaj francan lingvojn ĉar en vilaĝoj oni parolas kirundan lingvon, kaj en lernejo oni instruas en la franca lingvo.

La instruistoj, kiuj estis en vilaĝoj de Buĵumbura instruis 18 gelernantojn, en Bururi oni instruis 65 gelernantojn kaj en Makamba, oni ricevis 13 gelernantojn. Entute, 96 gelernantoj sekvis la kursojn de la seminarioj.

En tiuj vilaĝoj nun estas E-kluboj, kaj ĉiu klubo havas estraranojn (prezidanton, sekretariojn, bibliotekiston). Por bone lerni kaj evoluigi nian bonan kaj belan, valoran kaj pacan lingvon Esperanto, la gelernantoj multe bezonas E-librojn kaj kasedojn por aŭskulti kiel prononci Esperanton.

Koran saluton al vi.



Samideanece,
Hassano Ntahonsigaye
ntahonsigayea@yahoo.fr
BP 22, BI-Rumonge - BURUNDIO



[Publikigita en la dissendo-listo:

<<http://groups.yahoo.com/group/landa-agado>>, mesaĝo n-ro 12918].

Entuziasma lernoĉambro

Raportis: Aloísio Sartorato

Fotoj: Neide de Barros Rêgo

Nuntempe funkcias du klasoj de Baza Kurso de Esperanto, sub mia gvidado, en la sidejo de Niterói Esperanto-Klubo.


La unua klaso komencis studi en marto kaj finos sian lernadon en la fino de novembro. La lecionoj okazas ĉiumarde kaj la lernolibro uzatas estas “Iniciação à Fala do Esperanto”. Enskribiĝis 15 gelernantoj, sed nuntempe sekvas regule la kurson 10 gelernantoj.

La dua klaso komencis studi en aŭgusto kaj finos sian lernadon meze de decembro. La lecionoj okazas ĉiŝaŭde kaj la lernolibro elektita estas “Esperanto para Principiantes”. Enskribiĝis 15 gelernantoj, sed nuntempe sekvas la kurson regule 10 gelernantoj.



Aloísio Sartorato

Ano de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, verkisto de unu el plej popularaj enlandaj lerniloj, nome “Esperanto para Principiantes” (Esperanto por komencantoj), kunfondinto de Brazila Esperantista Junularo (BEJO) kaj kunordiganto de la projekto “Esperanto en la Bibliotekojn”, kiu jam ekspedis 800 librojn al 62 enlandaj kaj 11 alilandaj bibliotekoj.



Niterói Esperanto-Klubo

Av. Ernâni do Amaral Peixoto, 207/1609

CEP: 24022-900 Niterói/RJ

Telefona: (21) 2621-1422

BILDRAKONTO POPULARIGAS SCIENCON

Ni jam montris per serio de tri artikoloj la pedagogian uzadon de bildstrio i.a. por alfabetigo, amasinformado, kaj lernado de fremdlingvo.

Ĉi-numere ni prezentas retejon, kiu uzas bildrakonton por diskonigi sciencajn kaj teknologiajn sciojn. La projekton gastigas en la interreto Asocio Kono sen Landlimoj (france, *Savoir sans Frontières*).

Kiel skribis la sciencisto kaj desegnisto Jean-Pierre Petit, fondinto kaj prizorganto de Asocio Kono sen Landlimoj, “Scio estas la bazo de libereco, ĉar post kiam oni ĝin akiras, ĝi ne plu povos esti forprenita.” Tial, per sia talento kaj esplorejo, Jean-Pierre Petit kreis la bildulon Anselmo, kiu helpas lin popularigi sciencon kaj teknikajn sciojn en dekoj da lingvoj.

En la retejo de Kono sen Limoj estas disponeblaj, por senpagaj elŝutoj, ĉirkaŭ 30 bildalbumoj de Anselmo kaj lia amikaro. La jam eldonitaj bildalbumoj superas 250 tradukojn en trideko da lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto. La esperanta traduko konsistas el nur du titoloj “Ĉio relativus”, tradukita de Roland Platteau (2007) kaj “Kaj por kelkaj kromaj amperoj”, tradukita de Pierre Chibleur (2007). Sekvas ligiloj al la esperantigitaj bildalbumoj:

<<http://www.savoir-sans-frontieres.com/download/epo/toutestrelatif.htm>> kaj <<http://www.savoir-sans-frontieres.com/download/epo/quelquesamperes.htm>> .

Aparte interesa estas la ligilo <http://www.savoir-sans-frontieres.com/JPP/telechargeables/free_downloads.htm#lithuanien>, per kiu oni povas akompani la evoluon de la tradukoj kaj kuriozajn kulturajn intervenojn en la verkon de la aŭtoro, kiu devis, almenaŭ en du okazoj, adapti la veston de unu el siaj kreaĵoj.



<http://www.savoir-sans-frontieres.com>

Komentoj: Paulo Sérgio Viana

Érico Veríssimo estas talenta brazila verkisto, kiu naskiĝis (1905) kaj mortis (1975) en la suda ŝtato Rio Grande do Sul. Li produktis belan kolekton da romanoj pri la vivo en sia landregiono, kiujn li kunigis sub la ĝenerala titolo “Tempo kaj Vento”, kaj kiu meritas stari inter la plej brilaj verkoj en la brazila literaturo. Tamen, “Olhai os Lírios do Campo” estas eble lia plej konata, furora novelo. Ne senmerite. La tuta rakonto estas emocioplena, belstila, kortuŝa. La homfiguroj estas trafe konturitaj, la sentoj – ĉu melankoliaj, ĉu fervoraj – havas intensajn kolorojn. Tradukanto devas klopedi konservi la simplecon kaj precizecon de liaj frazoj, sen perdo de emocio, sen nenecesaj ornamaĵoj. La elektita peco de la nuna “tradukodefio” ne estas aparte malfacila, sed ni povus elekti kelkajn tiklajn esprimojn en la originalo:

- *“Ela lhe dava uma vaga angústia, causava-lhe um indefinível temor...”* (Unu el la tradukintoj proponis: “Al li la pulsado estis donanta etan angoron, estis kaŭzanta nedifineblan timon”. Ĉu necesas tiom da participoj? Ĉu la frazo ne sonas peze, kvankam gramatike korekta?).

- *“O atroar das máquinas era um ruído ameaçador”* (unu tradukinto elektis: “la tremigo de la maŝinoj”).

- *“... remexeu nos papéis...”* (unu tradukinto elektis: “multemovis paperojn”; alia tradukinto iom malprecize elektis: “ilin manumis”).

- *“... uma rapariga magra de ar cansado.”* (mi ne povas konsenti kun unu el la tradukintoj, kiu skribis: “asistantino, kiu estis lacaera maldikulino”).

- *“... com jeito de cansada.”* (unu tradukinto elektis: “Vi, S-ino, fartas tre pala kaj laca aspekte.”; ĉu la esprimo sonas kiel tute natura Esperanto?).

- *“A criatura tinha um jeito encolhido de passarito doente.”* (Jen kion proponis unu el tradukintoj: “La vivulino havadis ŝrumpitan manieron de malsana birdeto.”. “Vivulino” ne plaĉas al mi; “ŝrumpitan” devus esti “ŝrumpintan”).

● “... *meio constrangida*.” (unu proponita solvo, kiu ne plaĉis al mi: “iom devigita”; unu el la tradukintoj trovis belan solvon: “kun iomete da embaraso”).

Strangajn esprimojn mi trovis en iuj tradukoj:

- “Ne trovante tiojn, kiojn li serĉadis...”
- “caneta”: ĉu “skribilo”? ĉu “globkrajono”? Ĉu ne preferinde “plumingo”?
- “Vi devas flegu vin, S-ino Ilsa.” Certe temas pri tajperaro, ĉu.
- Unu el la tradukintoj preferis ne traduki la nomon “*Eugênio*”, kvankam “Eŭgeno” estas internacia, bone konata Esperanta formo; oni povas respekti lian elekton, sed ne la elekton de alia tradukinto, kiu esperantigis ĝin kiel “Eŭgenio”!
- En unu el la tradukoj, ĉu la frazo “La oficejo ŝajnis al li pli senama kaj kruda” estas fidela al la originalo (“*O escritório lhe pareceu mais frio e convencional...*”)?
- Ĉu “*Ministério do Trabalho*” estas tradukebla per “Prilabora Ministerio”, kiel proponis unu el la tradukintoj?
- Unu el la tradukintoj elektis por “*quando me deito*” la esprimon “je la dormohoro”. Ĉu fidele?

Resume: la nivelo de la tradukintoj, kiuj kuraĝe partoprenis sendube altiĝis – jen pruvo pri la valoro de niaj tradukodefioj ĉe BRAZILEI. La traduko numero 3 ŝajnas al mi tre bona: flua, natura, trafa, simpla. Pure Esperantajn esprimojn la talentulo trovis por ĉiuj faliloj. Atentu pri liaj belaj solvoj. Mi ne proponos ĉi-foje miajn proprajn solvojn, ĉar mi simple ne trovis pli bonajn vortojn ol li! Gratulon!

La tradukon elektitan kiel plej bona sendis Leandro Tomé Abrahão, el la urbo Uberlândia, ŝtato Minas Gerais. Kiel libro-donacon li elektis la klasikaĵon “Postmortaj rememoroj de Brás Cubas” de Machado de Assis, kaj tradukita de Paulo S. Viana.

Elektita traduko: Leandro Tomé Abrahão

EŬGENO

Li trairis la internan korton de la fabriko. La grandaj betonaj pavilonoj ŝajnis tremeti pro la ritmo de la maŝinoj. EŬgeno aŭdis tiun duonaŭdatan batadon, kiu aspektis al li kvazaŭ batado de grandega koro subtera. Ĝi naskis en lin ian malprecizan korpremon, kaŭzis al li ian ne klare difinitan timon: temus pri la afliktiĝo de homo sentanta sub si la agitiĝon de ia homaraĉo, kiu laboras kaŝe celante detruadon. La tondrado de la maŝinoj bruadis minace.

La oficejo ŝajnis al li pli malvarma kaj rutina ol alitage. Li altabliĝis, malfermis unu tirkeston, kirlis la paperojn... Ne trovinte kion li serĉis, li vokis la sekretariinon, virineton malgrasan kaj lacaspektan.

— Bonan tagon s-ino Ilsa. Ĉu iu demandis pri mi?

— Ja neniŭ, s-ro.

— Kie estas la paperfolioj sendotaj al la Ministrejo pri Laboro?

— En la meza tirkesto.

Li remalfermis la tirkeston kaj trovis la paperojn.

— Vi pravas, jen ili.

Li metis ilin sur la tablon, ekprenis plumon.

— Vi palas kaj aspektas lace lastatempe. Ĉu ne rekomendinde ekferii?

Li subskribis la paperojn senatente, sen kontroli ilin. Li nun eksentis fratan interesiĝon al la sekretariino.

La aspekto de la ulino estis de singardema malsana birdeto.

— Kaj la surdorsa doloro... ĉu ĝi ankoraŭ ne ĉesis?

— Kiam mi kuŝas ĝi foje okazas.

— Eble pro via sidmaniero dum vi skribas per la skribmaŝino.

Vi bezonas zorgi pri vi s-ino Ilsa.

La virino ridetis, duonĝenite.

Veríssimo, Érico – *Olhai os Líros do Campo*, 77-a eld.,
eldonejo Globo, 1997.

Traduku la ĉi-suban tekston de Luis Fernando Veríssimo kaj sendu vian solvon rete aŭ poŝte plej malfrue ĝis la 1-a de februaro 2009.

Solidários na porta

Vivemos a civilização do automóvel, mas atrás do volante de um carro o homem se comporta como se ainda estivesse nas cavernas. Antes da roda. Luta com seu semelhante pelo espaço na rua como se este fosse o último mamute. Usando as mesmas táticas de intimidação, apenas buzinando em vez de rosnar ou rosmando em vez de morder.

O trânsito em qualquer grande cidade do mundo é uma metáfora para a vida competitiva que a gente leva, cada um dentro do seu próprio pequeno mundo de metal tentando levar vantagem sobre o outro, ou pelo menos tentando não se deixar intimidar. E provando que não há nada menos civilizado que a civilização.

Mas há uma exceção. Uma pequena clareira de solidariedade na jângal. É a porta aberta. Quando o carro ao seu lado emparelha com o seu e alguém põe a cabeça para fora, você se prepara para o pior. Prepara a resposta. “É a sua!” Mas pode ter uma surpresa.

— Porta aberta!

— O que?

Você custa a acreditar que nem você nem ninguém da sua família está sendo xingado. Mas não, o inimigo está sinceramente preocupado com a possibilidade da porta se abrir e você cair do carro. A porta aberta determina uma espécie de trégua tácita. Todos a apontam. Vão atrás, buzinando freneticamente, se por acaso você não ouviu o primeiro aviso. “Olha a porta aberta!” É como um código de honra, um intervalo na hostilidades. Se a porta se abrir e você cair mesmo na rua, aí passam por cima. Mas avisaram.

Quer dizer, ainda não voltamos ao estado animal.

O suicida e o computador, Porto Alegre, L&PM, 1992.



Osmar

Jam tempo estas por rememriĝi
kaj garantii en 2009 pluan
ricevon de via **Brazilei!**
(Vidu pliajn informojn en aparta aliĝilo)

Retradioj



**Vivantan lingvon oni
kaptas per la orelo**